# Anĝeluso

En la nomo de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito.
Amen.

La anĝelo de la Sinjoro anoncis al Mario,
kaj ŝi koncipis de la Sankta Spirito.

*Saluton, Mario, gracoplena.*
*La Sinjoro estas kun vi.*
*Benata vi estas inter la virinoj,*
*kaj benata estas la frukto de via sino, Jesuo.*

*Sankta Mario, Dipatrino,*
*preĝu por ni pekuloj*
*nun kaj en la horo de nia morto.*
*Amen.*

Jen mi estas la servantino de la Sinjoro,
fariĝu al mi laŭ via parolo.

*Saluton, Mario...*

Kaj la Vorto fariĝis karno
kaj loĝis inter ni.

*Saluton, Mario...*

Preĝu por ni, sankta Dipatrino,
por ke ni fariĝu indaj la promesojn de Kristo.

Ni preĝu: Enverŝu, ni petas, ho Sinjoro, Vian gracon
en nian animon. Per la anĝela anonco ni ekkonis
la enkarniĝon de Kristo, Via Filo. Per Lia pasiono kaj kruco
ni estu gvidataj al la gloro de la reviviĝo. Pri tio ni petas
per Kristo, nia Sinjoro.
Amen.

Gloro al la Patro kaj al la Filo kaj al la Sankta Spirito,
kiel en la komenco, tiel nun kaj ĉiam, kaj en eterno. Amen.